

	<h1>PENSEO</h1>	<p><i>N-ro 232</i> <i>feb. / 2011</i></p>
<p>Monata Beletra Revueto en Esperanto Honorita de Premio Grabowski, 1994</p>		
<p>Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 22-a jaro <a href="http://www.elerno.cn/penseo/penlisto.htm">http://www.elerno.cn/penseo/penlisto.htm</a></p>		

## Anteo (Ĉinio)



# Neĝo

blankaj la sableroj  
estas kamuflaĵoj de nebulo.  
prenas ilin por konfetoj la sensciaj arboj .  
la monotona belo kovras  
urbojn kaj vilaĝojn.  
tion samkiel pejzaĝon traktas la saĝa homaro.  
demetado de vestaĵoj daŭras en la ardo.  
la bestoj nur per siaj haroj  
rezistas al la frosto elĉiela.  
iliaj spuroj estas pentroj de la vivo.  
sed laŭ ili la ĉasistoj ruzaj  
trovas la ombron de la morto.  
ankaŭ infanoj la naivaj  
desegnas bildojn en la blanko dupiede.  
fakte la suno ilustrita de la maturuloj  
ne povas baki ilian esperon.



## Eĉino (Ĉinio)

# Ora Pigo

Ora Pigo en nia rondo,  
feliĉigaĵo bonaŭgura,  
impresas per poz' belfigura  
sur ŝipo tra la mara ondo.

Sendas amik' per korespondo  
foton pri memoro gravura.  
Ora Pigo en nia rondo,  
feliĉigaĵo bonaŭgura.

Fone de impona sun-blondo  
sekvas danc' post kant' uvertura.  
Kulminas etoso plezura.  
Ascendas sur umea frondo

Ora Pigo en nia rondo.  
(2011-01-05)



## José Maria de Heredia (1842-1905)

# La konkeristoj


Same kiel falkaro el la nutrejo naska,  
Lacegaj pro portado de nobelaj mizeroj,  
El Palos' kaj el Moger', soldatoj kaj  
ŝipestroj  
Iris pro revebri de herogloraj taskoj

Ili iris konkeri la famegan metalon,  
Kiun Cipango gardis en malproksimaj  
minoj,  
Kaj alizeaj ventoj iliajn mastojn klinis  
Ĉe la mistera rando de la mondo feŭdala.

Vespere revis ili pri morgaŭoj epikaj,  
Dum lumo fosforeska de marbluo tropika  
Ĉarmis dormon ilian per orplena miraĝo;

Aŭ foje ĉe la pruo de blankaj karaveloj  
Ili vidis leviĝi en ĉielo sovaĝa  
El fundo de marego novajn stelojn  
fabelajn.

*Esperantigis*



## Tjeri (Francujo)



## Nazaré Laroca (Brazilo)



## Flugiloj

Forflugas la mevoj  
Adiaŭdirante...  
Sed ĉiam revenas.

Mi pilgrimante  
Eklernas la vojon  
Al Dio revenan.

*Cabo Frio, RJ Brazilo 2011*

## Vekiĝo

Mateniĝas ...  
Dio bluigas  
La matenon  
Or'fadene:  
Sunradie.

En la placo,  
Sur l' arbar',  
Eksalutas  
Gaje birdar'

Mian urbon  
Vekiĝinta!

*Juiz de Fora MG Brazilo - 28/06/2010*

## Paŭlo Sena (Brazilo)



## La venko de la hazardo

Eliras el la fundo de l' arbaro  
La ĝemo de la praepoka vivo.  
Elfluas el l' altaĵo de l' altaro  
L' incenso de sufero kaj soifo.

Sur lago de silenta alta rando  
Suriras la figuro tre mistera.  
Ĝi venas kun aŭguro kaj kun  
grando.  
Alvenis la hazardo tre mizera!

La voĉo de la tempo ja forpasis!  
Ĉar venkon la hazardo tuj deklaris.  
La forto de la vento ja frakasis

La baron kiu restis tra la vojo  
Kaj saĝon kiu staris kaj batalis  
Kun volo, kun impeto, vigla ĝojo.



## Brilo kaj nebulo

Oni ĉion aliigis  
Kiam ĉesis tiu brilo.  
Kaj ĉi ĉeso tuj indikis  
Ke la kaŭzo de l' foriro  
Kaŭzis timon kun ekiro  
De l' ombro kiu disigis  
Ĉiun homon kaj timigis  
Ĉiun ĝojon de la brilo.

Oni ĉion neniigis  
 Kiam kreskis la nebulo.  
 La kreskado tuj efikis  
 Al la fino de l' heleco  
 Al la ĉeso de l' ebleco  
 Restigi ĉiujn radiojn.  
 Kaj aliajn tragediojn  
 Tuj alportis la nebulo.



**FRANO ALFIREVIĆ (1903-1956)**

## VESPERMANĜO ĈE LA MARO

Jam silentiĝis en reto fiŝa ar' arĝenta  
 en luna lumo, sur bordo, en silent' mergiĝis;  
 mar' brila kiel vitro trankvilas senventa,  
 unu blanka rif' sub nuboj estingiĝis.

Post rifo rif' jen brilas kaj malhelas  
 tra nokt' vojante sur marvastaj padoj.  
 Al vespermanĝo nia, lumon lun' alpelas  
 dum en ora fajro fiŝoj rostiĝas sur kradoj.

Jen eta moment' kiam l' vivo ŝajnas bela.  
 Fiŝistoj rondsidas ĉe manĝo vespera;  
 vintosto leviĝas al maro malhela  
 tra spaco vibras el gorĝoj kant' modera.

Nun forgesendas ĉiu amara momento:  
 infanoj, edzino, laboro malĝua,  
 cedendas homo ĉi-hore kiel vel' al vento,  
 vivsonoj eksoras lante super l' maro blua.

La grotaj muroj kaj volbo eĥas pro kantoj,  
 senton de fort' kaj sano donas fiŝodoro flanka,

la homoj serenas ĉevine kiel maraj plantoj.  
 La luno sin lulas en eta nuboj blanka.

*Tradukis el la kroata:*



**Josip Pleadin**  
 (Kroatio)



**Ina Rousseau (1923 - 2005)**

## Edeno

Ĉu ankoraŭ en Edeno ie staras,  
 forlasita kiel urbruin',  
 kun pordoj dumeone fermajlitaj,  
 fiaskinte, la ĝarden'?

Ĉu voluptajn tagojn tie sekvas  
 voluptaj noktoj kaj krepusk',  
 kie flavegaj kaj purpuraj fruktoj  
 putrante pendas de arbusk'?

Ĉu rete sub la tero tie iras  
 kiel puntaĵo tra la rok':  
 la peza, neĉerpita erco  
 de oro kaj oniks' de tiu lok'?

Ĉu malseke tra verdaĵoj tie fluas  
 ankoraŭ kun murmuro kaj reson',  
 kvarop' da vitre klaraj fluoj  
 el kiuj trinkas nek anĝelo, nek  
 demon'?

Ĉu ankoraŭ en Edeno ie staras,  
 neglektita kiel urbruin',  
 dum eonoj, damnite kaj putrante,  
 fiaskinte, la ĝarden'?

**Ina Rousseau**, el *Die Verlate Tuin* ('La Forlasita Ĝardeno'), 1954. El la afrikansa tradukita de



**Hannes van Loggerenberg**  
(Nederlando)



**Lariko (Usono)**


## Kvin Limerikoj

### I.

Mian domon mastrumas roboto.  
Ĝi laboras per daŭra klopodo.  
Jes, roboton mi uzas,  
Sed duan mi rifuzas,  
Pro timo de robotkomploto.

### II.

Troviĝas en nordaj arbaroj  
Homoj kun netonditaj haroj.  
Vivas patroj kaj filoj  
Ĝis la fin' sen raziloj,  
Tiuj barbaj arbaraj barbaroj.



### III.

*Kia bono estas profeto sen profito?*  
—Enskribaĵo sur pordego de iu usona komercinstituto

Ĉiunokte profetas papago,

Pri iu ajn estonta tago.  
Ĝenerale ĝi pravas,  
Por malmulto kiu havas  
Sumon postulatan por pago.

### IV.

Kompatu la povrajn histrikojn.  
Surdorse ili portas pikojn.  
Danĝeraj, kompleksaj,  
Estas agoj seksaj:  
Instigo por krei limerikojn.

### V.

Mi estas biciklanta ulo,  
Tra sunbrilo, tra pluv' kaj nebulo.  
Estas mi malrapida,  
Ĉiam preterpasita,  
Eĉ de iu rajdanta sur mulo.



**Edward Estlin Cummings\***

s (l  
fo  
li  
o  
fa  
la  
s) l  
et  
s

*esperantigis kaj eksplikis*



**Ŭel (Brazilo)**

Normale konkreta poezio elstaras per sia grafika spaco, uzo de semiotiko (signoj el universale konataj tiparoj) kaj rekta sintakso, kie ĉefrolas substantivoj kaj verboj.

Feliĉe, la Ea teksto eĉ pli ol la originalo (angla teksto) semiotike riĉas (ja mi tiel volis ĝin)

Eksterkrampe en la angla oni havas "l one l i ness" (soleco) kaj interkrampe "a leaf falls" (unu folio falas)

Noto: signon l en la teksto de la poemo(j) oni laŭkonvene povas legi kiel numeralon (unu) kaj kiel literon l (lo)

El kelkaj analizoj kiujn mi konas pri la eksterkrampaĵo de la fontteksto (t.e. de la poemo anglalingve) tiu plej ŝatata de mi estas ĉi-tiu, ja tre resume:

l one l i ness = one one one i ness, alivorte: unu unu unu mi-eco, aŭ: oni (aŭ mi) kiel unu en sia unu-mem-eco.

Kaj, entutaĵe, ankaŭ ties samtempa soleco kaj kompani-aludo, ĉi lasta montrata per kelkaj signoparoj, jene: l(a = unu+unu, do duopo, kaj: le af fa ll.

Pli harfende ankaŭ eblas malkovri en ĉi bela poemo komparon de homa vivo al arba folio, ambaŭ kun siaj verda tempo, velka fazo kaj fina dekadenco, sed kun kia harmonia ritmo, laŭ montras la viciĝo de silaboj en kvazaŭfalmovo, tien kaj reen, ĝis fina softa algrundiĝo...

Laŭ mi la intenco de la aŭtoro (e.e.cummings) ankaŭ estas prezenti ideon de homa vivo kiel ĉenero de makrokosmo, kie ĉiuj apartaj estaĵoj finfine samsimilas en ties neforskuebla efemera vivociklo.

Cetere, la formo en si de la poemo nur pruvas la geniecon de li fidi al mikropoemo (vere hajko) tiom da grandaj konceptoj. Fakte, la poemo finkonstituas unuecon sub-egide de kunligitaj soleco kaj vivoefervesko.

Pri la portugala teksto, eblas percepti la belan transkreadon far A. de Campos, kiu kompensas la maleblon reteni la ekzaktan eksteran formaton de la originalo per speciala regalo: interplektite aperigi silabojn kun aludo al la formo de la poemo, per tiu "ha cai" kies portugala kompleta formo do estas "haicai", Ee: hajko.

Ĉu vi surprize demandas: Kaj kio pri la Ea teksto?!

El ĉio supre dirita, krom rekta "l folio falas" legebla interkrampe, eksterkrampe la teksto komence legiĝas:

s, sekvata de (l, kio ekvivalentas al s+l, alivorte so+l, ja sol' (el solo aŭ soleco)

Kaj fine de la versoj tio ripetiĝos, jene: s)l, plus et s, kio ekvivalentas al sol et s, alivorte soleco.

Kaj, se oni volas, rekta lego de la unua (komence aperanta) s ligita al tiu fina l et s ree donos:

s l et s, do soleco.

Krome:

Tiu fina l et s povas esti apartige legata kiel unu et so, alivorte "unueco"...

Laste, la sekvo (jam proksime de la fino de la poemo):

la

s) l

et

ebligas, en iom ronda lego, malkovri jenan latineskon:

l = unu

et = et

s) = so

la = la

alivorte unu et sola, t.e. "unu kaj sola"... [Ho kaj Ee: "unuec'sola"...]

\**Edward Estlin Cummings (e. e. cummings): Cambridge (Mass.) 14-an okt. 1894 - North Conway (New Hamp.) 3-an sept. 1962. Usona poeto, pentristo kaj teatra aŭtoro.*



# Ĉineske


## Eto (Ĉinio)

### Ŝia kiso

—laŭ ĉineska skemo Yanermei\*  
 en ŝia milda rigard'  
 brilas juna ard'  
 kun aspiro  
 kun pasio  
 kun ama vart'

ŝia kis' sur mia vang'  
 per senta bombard'  
 ebriigas  
 min en varmo  
 de fola mart'

*\*Yanermei (ĉarma okulumo): ĉina fiksfirma poemo el du strofoj kun po 5 versoj de 7,5, 444 / 75,444 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xxa / xa,xxa (x=senrima)*



### Decidemo

—laŭ ĉineska skemo Santaci\*  
 eĉ se mi donitas  
 per alta honoro  
 kaj granda monsumo  
 mi ja kun ignoro  
  
 forĵetos tiaĵojn  
 por kunĝui nure

kun vi ununoktan  
 dolĉecon plezure

*\*Santaci (tri terasoj): ĉina fiksfirma poemo el kvar versoj de ses silaboj kun krucrimo.*

### Vagabonda bardo

—laŭ ĉineska skemo Zhuzhici\*

de kiam decidis mi  
 migri de la famili'  
 mi jam restigis spurojn  
 miajn tra l' teritori'

jen sur la step' senlima  
 mia loĝej' kutima  
 estas tendo malgranda  
 en migrado pilgrima

nokte sub brila luno  
 mi per voĉo de juno  
 kantas akompanate  
 de gitaro en kuno

oh, vi bela knabino  
 ne min kun korinklino  
 amas pro mia kantad'  
 nek dronas en fascino

ĉar morgaŭ mi denove  
 ekmigros multemove  
 en sencela drivado  
 ien ajn laŭbontrove



*\*Zhuzhici (Bambuoj): ĉina fiksforna poemo el kvar versoj de sep silaboj laŭ rimaranĝo a, a xa (x=senrima)*



—laŭ ĉineska skemo Busuanzi\*

sen ajna motiv'  
mi volas vere  
troviĝi jen apud ŝi  
ĉiam libere

mi ja ne scias  
ĉu mi pretere  
falís en amon al ŝi  
kaŝe prefere

kiam mi fermas  
okulojn jame  
mi vidas ŝin aliri  
ridete ame

tiam mia kor'  
ekbrulas flame  
impulso ekleviĝas  
elpuŝe rame

sed vid-al-vid  
renkonte al ŝi  
mi jam dronas en stupor'  
sen am-fantazi'

mi konfuzitas  
sen ajna konsci'  
pri am-deklar' perbuŝa

al beleta ŝi  
tial mi kaŝas  
ŝin devigite  
en mia korprofundo  
ĉiam evite

mi nur elektas  
jam senekscite  
la kaŝan amon al ŝi  
ja senmerite

*\*Busuanzi (aŭguristo): ĉina fiksforna poemo el du strofoj kun po kvar versoj de 55,75 silaboj kun duona rimo.*



## En mia sino

—laŭ ĉineska skemo Dielanhua\*

Vi softe en mia sin'  
senparola  
nestas kun kapklin'.  
Min nure regas fascin'  
de via depend-inklin'.

En mia memor-domin'  
restas kun vi  
nur svelta bikin',  
inter mamoj la ravin'  
kaj lipoj de karmezin'.

*\*Dielanhua (Papilio super floroj): ĉina fiksforna poemo el du strofoj kun po 5 versoj de 7,45,7,7 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa,a,a*

(*x=senrima*)



## Veĵdo (Ĉinio)



Al mia retamikino

Belpura

okaze de ŝia naskiĝtago 2011

—laŭ ĉineska skemo Busuanzi\*

ĉiuvespere  
 en nokta kviet'  
 vi ja sendas saluton  
 per la interret'  
  
 vi ne impresas  
 per vanga koket'  
 sed per arĝenta voĉ' al  
 babila duet'  
  
 en ĉi gaja hor'  
 al vi Belpura  
 mi sendas bondeziron  
 kun sent' plezura

akompanu vin  
 feliĉo nura  
 kaj sentimento ĝoja  
 en viv' future

\**Busuanzi* (aŭguristo): ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po kvar versoj de 55,75 silaboj kun duona rimo.



## Viktoro (Ĉinio)

Ni iras sub la luno

—laŭ ĉineska skemo Yexingchuan\*

bele glimanta luno  
 en nokto  
 kiel skuno  
 drivas flose  
 en nubaro  
 kun blanka kostumo  
  
 ni iras jen en kuno  
 trankvilaj  
 en pur-lumo  
 tra knabeco  
 tra maturo  
 tra brilanta juno



\**Yexingchuan* (nokta ŝipvojaĝo): ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun ses versoj de 7,34,446 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa,xxa (*x = senrima*)



# Vintro

—laŭ ĉineska skemo Shengshengman\*  
 en ĉi sezon'  
 mi ne volas  
 vin vidi per person'.  
 oni plumpas vidon  
 kun neĝa fon'  
 prezentas mallerte  
 pezege.  
 kun knara son'  
 paŝadas  
 pasantoj  
 sur la blanka gazon'.

mi petas kun pardon'  
 jen al vi  
 ĉar dura kiel ŝton'  
 vest-kiraso.  
 mi havas je dispon'  
 la penetran povon  
 nek povas  
 iri kun kron'  
 en koron  
 vian de varma impon'.



\*Shengshengman (lanta sontreniĝo): ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 11 kaj 10 versoj respektive de 4,46,64,634,336 / 6,36,46,634,37 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa,xa,xxa,xxa / a,xa,xa,xxa,xa (x = senrima)

## Maupassant (1850-1893)



# FRAŬLINO PUTINJA

Ni estis elirontaj el la frenezulejo, kiam mi ekvidis en kortangulo grandan malgrasan viron, kiu obstine ŝajnis alvoki imagan hundon. Li mildvoĉe, tenervoĉe kriis : « Putinja, mia eta Putinja, venu tien, Putinja, venu tien, mia bela » frapante sur sian femuron, kiel oni faras por altiri al si la bestojn. Mi demandis al la kuracisto :

– Kion havas tiu ĉi ?

Li respondis al mi :

– Ho ! Tiu kazo ne estas interesa. Li estas kaleŝisto, nomata Francisko, kiu fariĝis frenezulo, ĉar li dronigis sian hundinon.

Mi insistis :

– Diru do al mi lian historion. La plej simplaj, la plej humilaj aferoj, estas iafoje tiuj, kiuj pli kormordas nin.

Kaj jen la historio de tiu viro, kiun oni tutkomplete eksciis de stalisto, lia kamarado.

« En la Pariza ĉirkaŭurbo vivis familio de riĉaj burĝoj. Ili loĝis en eleganta vilao, meze de parko, surborde de Sejno. La kaleŝisto, tiu Francisko, kampara knabo, estis iom malsprita, bonkora, naivega, facile trompebla.

Iun vesperon, dum li revenis ĉe siaj gemastroj, hundo eksekvis lin. Unue, li tute ne atentis pri tio ; sed la bestobstino por marŝi tuj post li, faris ke li baldaŭ sin returnis. Li rigardis, ĉu li konis tiun hundon. Ne, li neniam vidis ĝin.

Ĝi estis hundino de forloga malgraseco, kun grandaj pendantaj mamoj. Ĝi trotetis malantaŭe de la viro, kun veoplena kaj malsatega mieno, la vosto inter la kruroj, la

oreloj algluitaj kontraŭ la kapo, kaj ĝi haltis kiam li haltis, kaj reiris kiam li reiris.



Li volis forpeli tiun bestskeleton kaj kriis : « Foriru ! Ĉu vi tuj fuĝos ! Hu ! Hu ! » Ĝi malproksimiĝis je kelkaj paŝoj, kaj surpostaje plantiĝis, atendante ; poste, tuj post kiam la koĉero denove ekmarŝis, ĝi remarŝis malantaŭe de li.

Li ŝajnis pluki ŝtonojn. La animalo, balancigante siajn molajn mamojn, fuĝis iom pli malproksime ; sed ĝi revenis tuj kiam la viro turnis la dorson.

Tiam la kaleŝisto Francisko, kompatema, alvokis ĝin. La hundino timide alproksimiĝis, cirkle kurbigante la spinon, kaj ĉiuj ripoj levis sian haŭton. La viro karesis tiujn elstarajn ostojn, kaj tute kortuŝata pro tiu bestmizero : « Nu, venu ! » li diris. Tuj ĝi movis la voston, sentante sin akceptita, adoptita, kaj anstataŭ restadi en la suroj de sia nova mastro, ĝi ekkuris antaŭ li.

Li instalis ĝin sur la pajlo en sia ĉevalejo ; poste li kuris al la kuirejo por serĉi panon. Kiam ĝi ĝissate manĝis, ĝi ekdormis, ronde kuŝanta.

La postan tagon, la gemastroj, avertitaj de la kaleŝisto, permesis ke li gardu la animalon. Ĝi estis brava besto, karesema kaj fidela, inteligenta kaj milda.

Sed baldaŭ oni konstatis, ke ĝi kulpis pri terura manko. Ĝi ardiĝis pri amo de la komenco ĝis la fino de la jaro. Post kelka tempo, ĝi konis ĉiujn hundojn de la lando, kiuj tage kaj nokte ekinteresiĝis pri ĝi. Ĝi partigis kun ili siajn amfavorojn kun indiferenteco de ĉiesulino, ĝi ŝajnis plej bone rilati kun ĉiuj,

trenis malantaŭe de ĝi veran hundaron, kiu konsistis el la plej diversspecaj modeloj de la bojanta raso, iuj estis dikaj kiel la pugno, la aliaj grandaj kiel azenoj. Ĝi promeniĝis ilin tra la vojoj en senfinaj kursoj, kaj kiam ĝi haltis por surherbe ripozi, ili faris rondon ĉirkaŭ ĝi, kaj rigardadis al ĝi tirante la langon.

La homoj de la lando konsideris ĝin kiel fenomenon ; neniam oni vidis similan aferon. La bestkuracisto nenion komprenis.

Kiam, vespere, ĝi revenis en sian ĉevalejon, la hundaroj sieĝis la proprietaĵon. Ili enŝoviĝis tra ĉiuj aperturoj de la arbeda heĝo, kiu ĉirkaŭbaris la parkon, ruinigis la platbandojn, elŝiris la florojn, fosis truojn en la florbedojn, furiozigante la ĝardeniston. Kaj ili hurladis dum kompletaj noktoj ĉirkaŭ la konstruaĵo, en kiu loĝis ilia amikino, kaj nenio decidis ilin por foriri.

Dum la tago, ili penetris ĝis en la domon. Estis invado, plago, ruiniĝo. Ĉiumomente, la gemastroj renkontis en la ŝtuparo kaj ĝis en la ĉambroj, malgrandajn flavajn mopsetojn kun la vosto plumgarnita, ĉashundojn, buldogojn, ŝtelvagantajn ŝpicojn kun la haroj makulitaj, iajn vagulojn havante nek hejmon, nek sidlokon, gigantajn novlandajn hundojn kiuj forkurigis la infanojn.

Tiam, en la lando, oni vidis hundojn nekonatajn je dek leŭgoj ĉirkaŭe, kiuj alvenis oni ne scias de kie, vivis oni ne scias kiamaniere, kaj poste malaperis.

Tamen Francisko adoris Putinjan. Li senmalice nomis ĝin Putinja, kvankam ĝi ja meritis sian nomon ; kaj li senĉese ripetis : « Tiu besto, estas persono. Nur mankas al ŝi la parolkapableco. »

Li konfekcigis al ŝi belegan kolringon el ruĝa led, kun kupra plato sur kiu estis gravuritaj tiujn vortojn : « Fraŭlino Putinja, al la koĉero Francisko. »


Ŝi fariĝis dikega. Ju pli ŝi estis maldikega antaŭe, des pli ŝi fariĝis grasega, kun ŝvela ventro, sub kiu ĉiam pendsvingiĝis ŝiaj longaj

balancantaj mamoj. Ŝi grasiĝis subite, kaj nun ŝi pene marŝis, disigante la kruojn kiel la homoj tro dikaj, kun la faŭko malfermata por spiregi, laciĝegante tuj kiam ŝi provis kuron.

Cetere, ŝi montris fenomenan fekundecon, ŝi estis ĉiam graveda senprokraste post la akuŝfino, naskinte kvarfoje ĉiujare svarmon de malgrandaj idoj, kiuj apartenis al ĉiuj diversecoj de la hunda raso. Francisko, post elektinte tiun, kiun li lasis al ŝi por « pasigi sian lakton », kunigis la aliajn en sian stalan antaŭtukon, kaj sen kompato iris ĵeti ilin en la riveron.

Sed baldaŭ la kuiristino aldonis siajn plendojn al tiuj de la ĝardenisto. Ŝi trovis hundojn ĝis sub sia forno, en la telermeblo, en la karbosubtegmento, kaj ili ŝtelis ĉion, tio kion ili trafis.

La mastro, malpacienigita, ordonis al Francisko, ke li sin malembarasu de Putinja. La viro, afliktita, serĉis doni ŝin al nova mastro, sed neniu volis ŝin. Tiam li decidis perdi ŝin, kaj li konfidis ŝin al veturigisto, kiu devis kampare delasi ŝin je la alia Pariza flanko, apud Joinville-le-Pont [*Urbunigita-la-Ponto*].



La saman vesperon ĝuste, Putinja estis reveninta.

Necesis decidegi. Oni donis ŝin, kontraŭ kvin frankojn, al ĉeftrajnistino kiu iris al Havro. Li devis liberigi ŝin kiam li alvenis al la finstacio.

Post tri tagoj, ŝi revenis en sian ĉevalejon, lacegita, malgrasega, senhaŭtigita, komplete elĉerpita.

La mastro, kompatigita, ne insitis.

Sed baldaŭ la hundoj revenis pli multnombraj, kaj pli persistegaj ol neniam. Kaj, dum iun vesperon, oni aranĝis grandan

akcepton, trufita graskokino estis forrabita de dogo, ĉe la nazo de la kuiristino, kiu ne kuraĝis kontesti tiun ĉi al ĝi.

Ĉifoje la mastro tute koleris, kaj alvokinte Franciskon, li furioze diris al la koĉero :

– Se vi ne ĵetu tiun beston en la akvon antaŭ morgaŭ matene, mi maldungu vin, ĉu vi komprenas ?

La viro estis konsternata, kaj li supreniris en sian dormoĉambron por pretigi sian kofron, preferante perdi sian postenon. Poste li pripensis, ke nenie li povus esti dungiĝanta, ĉiam kiam li trenus malantaŭ li tiun ĝenan beston ; kaj li meditis, li laboris en bona domo, estis bone pagata, bone nutrata ; li sin diris, ke vere hundo ne indis tion ; li ekcitiĝis je la nomo de siaj propraj interesoj ; kaj li finis rezolute decidiĝi pri malembarasi sin de Putinja ĉe la tagiĝo.

Tamen, li malbone dormis. Ekde la tagiĝo, li ellitiĝis, kaj ekprenante fortan ŝnuron, li iris serĉi la hundinon. Ŝi malrapide stariĝis, sin skuis, etendis siajn membrojn, kaj alvenis por festigi sian mastron.

Tiam li nehavis kuraĝon, li tenere ekbrakumis ŝin, karesante ŝiajn longajn orelojn, kisante ŝin sur la muzelon, prodigante al ŝi ĉiujn tenerajn nomojn, kiujn li konis.

Sed ĉe najbara horloĝo sonis la sesa. Endis ne plu heziti. Li malfermis la pordon : « Venu », li diris. La besto svingis la voston, komprenante ke oni tuj eliros.

Ili iris al la riverbordo, kaj li elektis lokon, kie la akvo ŝajnis profunda. Tiam li nodis ekstremon de la ŝnuro al la bela kolringo el ledo, kaj levprenante dikan ŝtonon, li alligis ĝin al la alia ekstremo. Poste li enbrake ekprenis Putinjan, kaj furioze kisis ŝin kiel personon, kiun oni tuj forlasis. Li tenis ŝin premita kontraŭ sia brusto, lulis ŝin, nomis ŝin « mia bela Putinja, mia eta Putinja », kaj ŝi ne kontraŭstaris, grumblante pro plezuro.

Dekfoje, li volis ĵeti ŝin, kaj ĉiam la koro mankis al li.

